# La Hodiaŭa Ĵurnalo

2017-11-20 n-ro 361


# Kongo-baseno: grandaj kvantoj da karbona dioksido ($CO_2$) entenitaj en la torfejoj




Manifestacioj postulas demision de Mugabe en Zimbabvo

La borso - investado aŭ spekulado

Nedezirinda sekvo de cezara sekco

**La Hodiaŭa Ĵurnalo**

Ĉiutaga publikaĵo kun novaĵoj, aktualaĵoj kaj diversaĵoj – pri la mondo, scienco, socia vivo kaj Esperantujo.

**Misio**
Prezenti interesajn ĉiutagajn publikaĵojn por oportuna legado

Redaktoro
kaj grafikisto: Rafael S. Lima
Revizianto: Andrej A. Peĉënkin
[Андрей А. Печёнкин]

**Kontakto**
hodiauajurnalo@gmail.com

*Sendu viajn aktualajn novaĵojn, en Esperanto, kaj vi verŝajne trovos ilin en la ĵurnalo.*

La redakcio ne nepre subtenas iujn enhavojn aŭ samopinias kun ties aŭtoroj.

*Elŝutu la dosieron, la fontoj, la ligiloj kaj la enhavlisto estas alklakeblaj.*

Farita per: Scribus

Kongo-baseno: grandaj kvantoj da karbona dioksido (CO2) entenitaj en la torfejoj
*La dua plej granda tropika arbaro en la mondo p. 03*

Manifestacioj postulas demision de Mugabe en Zimbabvo
*La manifestaciantoj okupis preskaŭ ĉiujn ĉefajn stratojn en Hararo p. 04*

Ĝisdatigo en roboto kapabligis ĝin lerte cirklosalti
*Roboto "Atlas" p. 04*

La borso - investado aŭ spekulado
*Borsa mekanismo p. 05*

Nedezirinda sekvo de cezara sekco
*Cezara sekco kaj obezeco p. 06*

Hodiaŭe
*Nadine Gordimer; Selma Lagerlöf; kaj planto p. 07*

# Kongo-baseno: grandaj kvantoj da karbona dioksido ($CO_2$) entenitaj en la torfejoj

La konga ekvatora arbaro estas la dua plej granda tropika arbaro en la mondo. Ĝi estas konata pro sia besta kaj vegetala biodiverseco. Sed la malkovro de grandegaj stokoj de $CO_2$ entenata en ties grundoj maltrankviligas.




La torfejoj de la Kongo-baseno, sur kies grundo kreskas la ekvatora arbaro, fakte entenas preskaŭ 30 miliardojn da tunoj da $CO_2$.

Tion produktas la homaro daŭre de tri jaroj.

Simon LEWIS, scienca eksperto ĉe la universitato de *Leeds*, kartografiis la vastegan areon de tiu stoko de karbono: «Por la unua fojo, ni publikigis ĉi-jare, mapon de la torfejoj de centra Kongo. Ĝi montras, ke ili kovras ĉirkaŭ 145 000 km2, areon iom pli grandan ol Anglio».

**Danĝero por la surlokaj loĝantoj**

Matt DAGGETT, respondeculo pri «arbaro-projekto» ĉe *Greenpeace*, maltrankviliĝas pro la kreskanta senarbarigo de Kongo: «Se ni vere volas respektadi la engaĝiĝojn de la Pariza Interkonsento pri la klimato, ni vere bezonas, ke la torfejoj plu retenu la karbonon ekster la atmosfero. Do, ke ni atentigu pri la konstruadoj de vojoj, pri la disvolviĝo de agrikulturo en la areo, por reteni tiujn stokojn de karbono».

Fakte la senarbarigo povus okazigi liberigadon de la gaso en la atmosferon.

Tiuj kvantoj de karbono estas tiel gravaj, ke nur ilia sola emisio povus kompromiti la interkonsentojn de Parizo.

Okaze de la COP23, la Konga registaro petis internacian helpon por konservi tiun arbaron.

Krom stoki vastan kvanton da $CO_2$, ĝi ebligas al la lokaj komunumoj vivteni sin. Bedaŭrinde, ĝia ekspluatado senigas la loĝantojn je ĝia faŭno kaj flaŭro. Loĝantino atestas: «Nun, ni nenion plu atendas de la arbaro. Pluraj personoj ekspluatadas niajn arbarojn, kaj dum tiu tempo, ni mortas pro malsato».

Neniam Milito Inter Ni

# Manifestacioj postulas demision de MUGABE en Zimbabvo

Dekmiloj da zimbabvanoj faris grandiozan manifestacion sabate [18 nov 2017] matene en la ĉefurbo Hararo. Ili esprimis subtenon al la agado de la armeo kaj postulis demision de prezidento Robert MUGABE.




Matene je la 10a horo, raportisto el la novaĵ-agentejo *Xinhua* [新华社 xīnhuáshè] vidis, ke la manifestaciantoj okupas preskaŭ ĉiujn ĉefajn stratojn en Hararo. Ili marŝis al la prezidentejo, kriante sloganojn. Antaŭ la pordo de la prezidentejo kolektiĝis granda nombro da manifestaciantoj. Iuj el ili intencis eniri la prezidentejon, tamen estis malhelpitaj de la gardistoj.


Frumatene la 15an de novembro la zimbabva armeo komencis militan agadon. Ili ekregis la ĉefajn organojn de la registaro, kaj publikigis deklaron per la nacia televido, neante intencon de puĉo. Ili promesis certigi la sekurecon de MUGABE kaj lia familio. Proparolanto de la armeo diris, ke la agado celas kapti krimulojn el la reganta partio kaj alporti ilin al la justeco.

Yu
Ĉina Radio Internacia

---

# Ĝisdatigo en roboto kapabligis ĝin lerte cirklosalti

Ĵaŭde la 16-an de novembro la firmao pri robotiko "*Boston Dynamics*" prezentis novan varianton de la roboto *"Atlas"*, kiu nun kapablas salti, eĉ per malantaŭa cirklosalto.



Ĝis nun *Atlas* estis programita por plenumi taskojn rilatantaj al iu profesia tasko, kiel ekzemple levi kaj porti skatolojn. La kapablo salti estis aldonita por plibonigi la ekvilibron de la maŝino.

Tiu tria versio de *Atlas* estas 75 kilogramojn peza, sed ĝi jam estis multe pli peza (375 kg). Por montri kelkajn ĝisdatigojn la firmao aperigis per ĝia jutubkanalo tiun filmeton (vidu).

*Boston Dynamics* fondite emis fari robotojn cele al militagadkampo. En la jaro 2013-a ĝi estis aĉetita de la firmao *Guglo*, kiu junie 2015 vendis ĝin al la japana firmao *"Softbank"*. Tiu azia firmao disvolvas ankaŭ la amikiĝeman roboton *"Pepper"*.

Paulo Cesar PIRES
esperanto.blog

# La borso - investado aŭ spekulado

La esenco de investado estas la elspezo de mono, dank' al kio investanto (ĉefe posedanto de iu entrepreno, kiu elspezas monrimedojn) povos ebligi aŭ eĉ multobligi sian profiton. Ekz. la firmao, kiu dungas laboristojn por fari fosaĵojn bezonas 10 laboristojn, kiuj devas fosi 100 horojn, sed aĉetante fosmaŝinon, la firmao bezonas unu personon, kiu devas labori nur 8 horojn. Kiam anstataŭ tio iu firmao aĉetas ion por poste vendi tion pli multekoste, tiam temas pri komerca agado.




Por vendi varojn kun profito, la firmao devas tiel fiksi la vendoprezon, aldonante kelke da procentoj, por kovri la aĉetkostojn, transportadon kaj laborhorojn de siaj dungitoj kaj impostojn, kaj krom tio restos kelka monsumo kiel profito, ĉar la komercisto estas simple la peranto inter la produktinto kaj aĉetonto, kiu lasta pagas ĉiujn kostojn inkluzive impostojn.

Tute alie aspektas spekulado, kiu okazas, kiam oni elspezas monon aĉetante ion kun la espero, ke iam la valoro (prezo) de tio kreskos (plialtiĝos). La valoro de la aĉetobjekto tiukaze ne kreskas pro iu perado sed pro la agoj de aliaj, tiuj agoj povas, sed ne devas, okazi. Alivorte spekulanto kalkulas je la prezokresko de akcio, grundo aŭ alia varo, kiu povos esti vendita altpreze estonte.

Tial la borso estas pura formo de spekulado, kaj mia intenco ne estas pritaksi tion.

La kontraŭuloj pri la opinio, ke en la borso okazas spekulado anstataŭ investado, asertas, ke la borsaj „investantoj" aĉetas „dividopartojn"(„partoprenojn") de iu firmao. Sed similan agadon oni povas facile entrepreni sen la partopreno de la borso, kio estas tute normala praktikado. Iu investas monrimedojn kaj kalkulas, ke la priinvestata firmao atingos profiton, kies parton tiu investinto ricevos, sen la institucio de la borso.

Kun la „borsa mekanismo" ligiĝas la nocio de la „plimulta fasko" („kontrolfasko"), kiu apartenas al la posedanto de la firmao kaj la cetero de la akcioj estas disponigata al la publika vendado en la borso. Sekve okazas la elspezo de dividendo, pridiskutata dum la plena kunveno de la akciposedantoj kaj akceptata per la decido de la plimulto (51%) el ili.

Multaj akciposedantoj opinias, ke ili posedas la parton de tiu aŭ alia firmao, sed verdire, la posedanto de la firmao estas nur tiu, kiu faras decidojn.

Multaj personoj identigas la borson kun t.n. „libera merkato". La libera merkato estas nur tiam, kiam okazas libervolaj decidoj kaj plena honesto inter ĉiuj flankoj de reciproka entrepreno. Ĉu ekzemple la „nigra merkato" estas libera merkato? Tie ja okazas komercado inter trompantoj kaj ŝtelistoj. Iom simile, la mondo de grandaj financoj, kie ligiĝas grandaj privataj bankoj kun centraj bankoj de ŝtatoj, inkluzive la borson, faras diversspecajn „financajn artifikojn", delikate dirite, kaj pli konkrete – obskurajn intrigojn. Se ni parolas pri la neceso resti honesta, tiam ni devas konsideri, ĉu eĉ en etaj detaloj ne

okazas malbono, maljusto, superruzo, iu agoj, kiuj erarigas eĉ unuopan homon, pro kio tiu perdas eĉ la proverban „groŝon”. Kio por financaj potenculoj ŝajnas esti sensignifa, por etaj perlaborantoj ofte estas jam problemo. Kiam ekzemple maljunulino aĉetas por si ion, kio laŭ la produktanto nomiĝas „Ŝinko de avinjo”, sed ŝi ne kapablas rimarki etliteran surskribon dorse, ke temas nur pri la 40-procenta enhavo de viando en la produkto, ĉu estas honeste?

Finante: por ke la kurzo de akcioj en la borso povu altiĝi, devas okazi senĉesa alfluo de la kontantaĵo, tiucele la nombro de la akciposedantoj devus kreski. Do tiuj, kiuj jam profitis dank’ al la borso, kompreneble popularigas ĝin, ĉar nur tiam ili plu profitos kaj pro tio ili preferas paroli tiukaze pri investado.

Andreo Bach
Esperanta Retradio

## Nedezirinda sekvo de cezara sekco

Ĉiam pli da informoj rilatas al la nedezirindaj sekvoj de la cezara sekco, ĉiam pli ofte aplikata, kelkfoje eldevigata de la naskantaj patrinoj. Lastatempe aperis informoj pri la interdependeco de la cezara sekco kaj obezeco, kiu povas rilati al la tiamaniere enmondiĝintaj infanoj.




La usonaj esploroj okazigitaj ĉe musoj elmontris, ke la ronĝuloj naskiĝintaj sekve de la cezara sekco estis fariĝantaj pli pezaj ol la musoj naskiĝintaj naturmaniere. Laŭ doktorino Maria Dominguez-Bello el la novjorka universitato la respondo, ĉu la mikrobiomo de la novnaskito influas la pli postan obezecoriskon estas ĉiam pli urĝa, ĉar en multaj mondopartoj la nasko sekve de cezara sekco estas praktiko elektebla de la virinoj, ne tute konsciaj pri ĝiaj konsekvencoj.

Al la esploroj estis subigitaj 34 musoj naskiĝintaj sekve de la cezara sekco kaj 35 naskiĝintaj naturmaniere. Evidentiĝis, ke la musoj enmondiĝintaj sekve de la cezara sekco post 15 semajnoj atingis pezon meze je 33 procentoj pli grandan ol de la musoj naskiĝintaj naturmaniere. Kaze de femaloj la pezo estis pli granda eĉ je 70 procentoj.

Krom la korpopezo estis konstatitaj diferencoj en la konsisto de mikrobiomo. Kontraste al la natura maturiĝo de la mikrobiomo ĉe musoj naskiĝintaj senintervene ĉe la musoj naskiĝintaj sekve de la cezara sekco en la vivkomenco ĝi maturiĝadis tro rapide por poste halti. La cezara sekco senigis la imunosistemon de la ido je natura etapo, dum kiu la organismo produktas substancojn, kiuj kontraŭefikas troan dikiĝadon. Pri la afero informis “*Science Advances*”.

Pola Retradio



## Nadine GORDIMER

**Nadine GORDIMER (naskiĝis la 20-an de novembro 1923, mortis la 13-an de julio 2014) estis sud-afrika verkistino. En 1991 ŝi estis honorata per la Premio Nobel de Literaturo.**

**Vikipedio**

## Selma LAGERLÖF



**Selma Ottilia Lovisa LAGERLÖF ([ˈsɛlma ˌʊtiːlɪa ˌlʊviːˈsa ˈlɑːgərˌløːv], esperantigite Selma Ottilia Lovisa Lagerlev) naskiĝis la 20-an de novembro 1858 en la bieno *Mårbacka* en la sveda provinco *Värmland*, mortis samloke la 16-an de marto 1940) estis sveda verkistino. En la jaro 1909 ŝi kiel unua virino gajnis la Nobel-premion pri literaturo.**

**En Esperanto aperis pluraj tradukoj.**

**Vikipedio**



## Bildo de la tago

*Plectranthus verticillatus.*

**Vikipedio**